Nürnberg atendas vin!

**PILO-PRESS**

Internacia
Informservo

N-ro 40/76 - 12 okt 1976
Aperas ĉiusemajne

Venu al la
Esperanto-Tagoj
30/31-10-1976
Detalojn vidu
sur paĝo 3!

**Eldonanto/Herausgeber:**
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## E K I serĉas kunlaborantojn

Achel, Belgio (pp) - Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio, mallonge nomata "EKI", disvastigas siajn kontaktojn tra la tuta mondo. EKI serĉas kunlaborantojn en diversaj landoj kaj petas komercajn entreprenojn, unuopajn industriistojn ktp. finance kaj kunlaborante apogi la EKI-laboron.

La laborprogramo de EKI estas vasta, ampleksanta diversajn kampojn de la ekonomia vivo. Unu el la plej urĝaj taskoj farendaj estas intertempe realigita, la naŭlingva fakvortaro por komerco (eldonejo Kluwer, Deventer, Nederlando). La nunaj ĉeftaskoj estas la t.n. etikedservo kaj la kreado de Landaj Oficoj en ĉiuj landoj.

La etikedservo celas instigi komercajn entreprenojn, ke ili metu sur siajn varojn ne nur nacilingvan tekston de la uz-informo, sed ankaŭ Esperanto-tekston. Ĉiu esperantisto kun rilatoj al entreprenoj povos helpi realigi tiun etikedservon.

Krome, EKI bezonas la moralan kaj financan apogon de multaj, tre multaj industrioj, komercaj entreprenoj kaj firmoj se ĝi volas sukcesplene kaj efike realigi sian programon. Jam haveblas cirkulerletero, konciza superrigardo de la EKI-laborprogramo kaj aliĝilo, presitaj en la lingvoj angla, franca, germana, itala, hispana, nederlanda, sveda kaj Esperanta. Pruviĝis ke sendistinga distribuo de tiuj paperoj al kiu ajn firmo aŭ entrepreno ne multe efikas. Necesas ke la adresoj kontaktotaj estu antaŭe informitaj pri EKI kaj ĝiaj celoj. Tial EKI bezonas la kunhelpon de ĉiuj esperantistoj, precipe de la fakdelegitoj por komerco kaj industrio, sed cetere de ĉiuj kiuj, en iu ajn maniero, kapablas, inter siaj komercaj rilatoj, prepari la terenon, substrekante la grandegan problemon de la hodiaŭa lingvo-ĥaoso en internaciaj komercaj kontaktoj kaj atentigante pri la racia solvo kiun prezentas la ĝenerala enkonduko de Esperanto.

Per tiu ĉi alvoko la Estraro de EKI denove petas ĉiujn doni sian plenan subtenon al la Instituto, informante la Sekretariaton pri adresoj de komercaj kaj industriaj entreprenoj, kiuj eble simpatias kun la celoj de EKI kaj pretas esti ĝiaj apogantoj.

Nur dank' al la aktiva kunhelpo de vi ĉiuj, la grava iniciato pri la fondo de EKI povos baldaŭ fariĝi unu el la plej okulfrapaj sukcesoj de Esperanto en la praktika vivo.

Nome de la Estraro de EKI: E.L.M. Wensing, Dennenstraat 9,
B-3581 Achel, Belgio.

******************************

## Prelegvojaĝo de Jerzy Grum

Hamburg (pp/gea) - Laŭ la plej novaj informoj, Jerzy Grum, redaktoro de la Pola Radio Varsovio (Esperanto) faros prelegvojaĝon tra F R Germanujo de la 20-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro 1976. Li estos en jenaj urboj resp. ĉe jenaj lokaj Esperantogrupoj:
21./22.10. Hamburg, 23.10. Bremen, 24.10. Münster, 25.10. Dortmund, 26.10. Wuppertal-Schwelm, 27.10. Düren, 28.10. Frankfurt/M, 29.10. Saarbrücken, 30.10. Mannheim-Ludwigshafen, 31.10. aŭ 1.11. Oberkirch, 2.11. Stuttgart, 3.11. Nürnberg, 4.11. Würzburg.

Pri la estonteco de SUK

LiEĝo (pp) - Ĉi-jare, de la 8-a ĝis la 29-a de aŭgusto, okazis la tria sesio de Someraj Universitataj Kursoj (SUK). Ĝi disvolviĝis en la moderna kvartalo de la Universitato de Antverpeno en Wilrijk inter la kutimaj aktivaĵoj de la somera universitata vivo, ĉar oni ja laboras dum somero en universitatoj.

La programo de tiu ĉi sesio enhavis kiel tiu de 1974 tri studdirektojn: estis denove biologio, sed por la unua fojo matematiko kaj sociologio. Estis prezentitaj sume 15 kursoj de po minimume 8 lekcioj 45-minutaj fare de 7 universitataj instruistoj el Norvegio, Usono, Grandbritio, Belgio, Hungario kaj Pollando.

Nova paŝo estis farita survoje al pliprofundiĝo per enkonduko de dusemajnaj kursoj en matematiko. Estas emfazende ke la matematikistoj tre diligente laboris dum pluraj ekstraj kunsidoj por diskuti terminologiajn problemojn en Esperanto. En la kadro de la sociologiaj kursoj okazis seminario dum kiu oni multe cerbumis pri la SUK-organizo.

Dum la sesio okazis 12 skribaj ekzamenoj pri kelkaj kursoj el la programo. La SUK-estraro pli poste informos pri tiuj ekzamenoj. Sur la eldona kampo, la SUK-asocio daŭrigis sian ĝisnunan politikon tiel ke jam aperis 2 kursotekstoj de SUK-76, ke 5 pliaj estos baldaŭ eldonitaj kaj ke 4 lastaj estas antaŭviditaj.

Kaj estonte? Oni multe diskutis pri la estonteco de SUK, ĉu dum vesperoj, ĉu en la kadro de la kurso pri teorio de organizaĵo. Se ĉiuj partoprenintoj akordiĝis pri la neceso de tia manifestacio kiel SUK en la esperantlingva medio kaj se ĉiuj sin deklaris tre kontentaj pri sia partopreno, ili tamen bedaŭris ke nur malmulte da personoj havis la eblecon ĉeesti. Krom vizitintoj, entute sekvis regule la kursojn 22 personoj el 7 landoj, t.e. meznombre ĉirkaŭ 7 personoj en ĉiu studdirekto. Oni tamen aldonu ke pluraj pliaj interesitoj ĉeestis ankaŭ diversajn lekciojn dum diversaj tagoj.

Leviĝas do la demando: ĉu havas sencon ke la lekciistoj dediĉu tiom da tempo kaj da energio al efektivigo de kursoj por tiel malgranda nombro da personoj, dum ekzemple la kursotekstoj kiujn ili verkas havas multe pli da sukceso?

La SUK-estraro decidis tamen klopodi trovi solvon kiu ne nuligos la ĝisnunajn atingaĵojn. Tiucele ĝi baldaŭ informos la esperantistan gazetaron pri sia estonta politiko. Ĉiukaze, oni jam povas diri ke la SUK-estraro esploras diversajn eblecojn por 1978 aŭ eĉ jam por 1977, interalie en Germanio. Inter la eblaj temoj, oni menciu geologion, astronomion, psikologion.

La organizantoj (Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3, Belgio) estas je dispono por ĉiaj sugestoj, informpetoj, ktp.

El Popola Ĉinio varbas

Pekino (pp) - De la 1-a de novembro 1976 ĝis la 31-a de januaro 1977 daŭras la 1977-a abonvarbada kampanjo de El Popola Ĉinio, la populara kaj ŝatata ĉiu-monata sinteza gazeto el Ĉinio. Dume alvenintaj novaj abonantoj aŭ reabonantoj povos senpage ricevi 1 ekz. de multkolora Esperanta murkalendaro de 1977.

| | | | |
|---|---|---|---|
| La abonpreo estas: | por 1 jaro | | 6,-- DM |
| | 2 jaroj | | 9,-- DM |
| | 3 jaroj | | 12,-- DM |

Abonu ĉe: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1
Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851

## Instruisto serĉata

Ekde la venonta jaro en la Instituto pri Kibernetika Pedagogiko Paderborn oni serĉas instruiston aŭ alian interesulon kun plena akademia finstudo en matematiko, aŭ psikologio, aŭ elektrotekniko aŭ lingvisto el ŝtato de la Eŭropa Komunumo.
Duontempe estos Esperanto-instruado kaj scienca esplora kunlaboro ĉi-rilate, duontage eblas liberaj studoj ekzemple por doktoriĝo.
Skribu antaŭ la 15-a de novembro 1976 al Institut für Kybernetische Pädagogik, Postfach 1567, D-4790 Paderborn (Prof. Dr. Helmar Frank).

---

## Esperanto-Ekspozicio en München

München (pp) - Ĉirkaŭ 150 interesuloj vizitis la Esperanto-Ekspozicion, kiun aranĝis la Fervojista Esperanto-Grupo kune kun la Esperanto-Klubo München sub la gvido de Josef Weidacher de la 9-a ĝis la 11-a de oktobro en la ekspoziciejo de Holzkirchner Bahnhof.

Sabate, la 9-an de oktobro, en la urbocentro funkciis Esperanto-stando, kie oni disdonis multajn informilojn kaj prospektojn. Lunde vespere, la 11-an de oktobro, okazis informprelego, kiun ĉeestis ĉ. 40 personoj. Reinhold Maier parolis pri la evoluo kaj signifo de Esperanto kaj donis mallongan provlecionon; Ludwig Thalmeier, Landshut, prezentis per lumbildoj praktikajn ekzemplojn pri la utiligo de Esperanto. Al interesuloj oni vendis lernolibrojn kaj vortarojn.

La ekspozicion vizitis ankaŭ s-ro Hagen, la estro de la sociala organizo de la fervoja direkcio München, kaj la estro de la sama organizo por Sudbavario.

Ke la ekspozicio okazis, ŝuldiĝas al Josef Weidacher, kiu ankaŭ faris la ĉefan laboron!

## GEA-informoj

La estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kunsidos la 30-an kaj 31-an de oktobro en Paderborn.

La jam delonge anoncita informilo en germana lingvo nun fine aperis. Temas pri kvarpaĝa folio, DIN A 5, kun la titolo "5 vor 12...für Europa" (5 minutoj antaŭ la 12-a...por Eŭropo).

## Kunveno en Nürnberg

Nürnberg (pp) - La 30-an kaj 31-an de oktobro 1976 okazos en Nürnberg kunveno de Bavara Esperanto-Ligo, en Meistersingerhalle Nürnberg, Münchener Strasse 21, Konferenzraum IV.

El la programo: Sabate, la 30.10.76 je la 11-a horo Esperanto-Libro-ekspozicio; de 14-a ĝis la 18-a horo laborkunsidoj; ekde la 20-a horo interkona vespero kun Esperanto-kvizo.

Dimanĉe, la 31-a de oktobro, je la 10-a horo diskutrondo pri kursgvidado sub la gvidado de Gerald Tucker, Germana Esperanto-Instituto; 13-a ĝis la 18-a horo publika Esperanto-ekspozicio kun informado, provlecionoj kaj Esperanto-elsendoj.

Bonvenaj estas ankaŭ gastoj el aliaj federaciaj landoj. Hotelĉambroj en Nürnberg estas haveblaj ekde 20,- GM. Informojn donas: Esperanto, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Richard Böttcher, Schweinfurt, mortis

La 14-an de oktobro 1976 mortis Richard Hans Böttcher, Schweinfurt. Li lernis Esperanton en la jaro 1925 kaj funkciis ĝis la jaro 1975 kiel sekretario de la Esperanto-grupo Schweinfurt. Li ĉiam aktive ankaŭ partoprenis en la bavara Esperanto-vivo, speciale en norda Bavario.

La funebra ceremonio okazos lunde, la 18-an de oktobro, je la 11-a horo, en la urba tombejo de Schweinfurt.

Anton Rupert Sittl 80-jara

La 10-an de oktobro 1976 festis la 80-an datrevenon de sia naskiĝo Anton Rupert Sittl, emerita registara inspektoro, München, fondinto de "Katolika bavara Esperanto-ligo". Por la preparo de la 4-a Eŭkaristia Esperanto-Kongreso en München 1960 papo Johano XXIII transdonis al li la "Arĝentan Pontifikan Medalon". Pri la jubileo informis ankaŭ "Süddeutsche Zeitung" menciiante lian Esperanto-agadon.

Internacia Esperanto-Seminario

Al parto de ĉi tiu PP-eldono estas aldonita aliĝilo por la 2-a Internacia Esperanto-Seminario de Sarlanda kaj Sudokcident-Germana Esperanto-Ligoj, okazonta de la 26-a de decembro 1976 ĝis la 2-a de januaro 1977 en Neustadt/Weinstr. Informojn donas: Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

Esperanto en Radio

Varsovio. De la jarkomenco ĝis fine de septembro 1976 la Esperanto-Redakcio de Pola Radio ricevis jam 800 korespondaĵojn pli ol en la sama periodo de la pasinta jaro. Certe al tiu sukceso ĉefe kontribuas la "kolonoj" de la redakcio. En la pasinta Esperanto-Ekspreso oni povis aŭdi recenzon de Jerzy Uspienski pri la scienca verko interlingvistika eldonita de la soveta eldonejo "Nauka" kun la titolo "Problemoj de interlingvistiko, tipologio kaj evoluo de internaciaj artaj lingvoj". Pri ĉi tiu eldonaĵo ni raportos pli detale en alia numero. El la politikaj programeroj elstaras temoj kiel senarmiĝo, Rodezio, Sudafriko kaj la ĝenerala asembleo de UNO.

Varsovio anoncas novan konkurson por la eksterlandaj aŭskultantoj. Respondojn al tri demandoj oni devas sendi ĝis la 31-a de decembro 1976. La konkursaj tekstoj estas senpage haveblaj ĉe: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Varsovio, Pollando.

Svisa Kurtonda Servo. Ges-roj Gacond daŭrigis sian prelegserion pri la "ora karbo", la sunenergio. En la prelegserio de d-ro A. Baur ŝajne okazis teknika eraro. Oni povis reaŭdi prelegon pri iu referendumo kaj recenzon pri la poŝlibro "Mia amata Esperanto" de R.Schulz, disaŭdigitajn jam en somero. Ĉu oni metis la malĝustan sonbendon?

Vieno. Laŭ la ĉi-semajna komentario de d-ro Alfred Macher, Prawda, la soveta partia organo, en artikolo pri la vivkondiĉoj en Aŭstrio, raportis duonvere. "Sed ĉie en la cetera mondo oni scias, ke la aŭstra ekonomio estas unu el la plej solidaj, ke ĝi apenaŭ suferis pro la internacia malkonjunkturo, ke nia monsistemo eminente stabilas, kaj ke nia vivnivelo estas pli alta ol iam antaŭe..." opiniis Alfred Macher. La kultura felietono, verkita de d-ro Karl Beckmann, temis pri du romanaj imperiestroj kaj ilia rilato al Aŭstrio: Marcus Aurelius kaj Probus.

"Ŝatataj, kvankam iom malpli vaste, estas, plie, la ĉiusemajnaj politikaj komentarioj de d-ro Alfred Macher, kiujn ni prezentas en zorge koncizigita kaj laŭ eblo simpla traduko. Precipe el tiuj komentarioj Ludwig Pickel, Nürnberg, citas almenaŭ kelkajn (foje eĉ ĉiujn) liniojn en sia "Pilo-Press", renome valora, ĉiusemajna Esperanto-informilo.." Citaĵo el la agadraporto 1975/76 de Radio Komitato, AEF, Aŭstrio.